



Septembro 1953. Nro 1.

LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Administracio: S-ro G. de Vries, R.P.I. Pav. AB, Bosdijk 771, Eindhoven, Nederlando

Giro Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

La 9a Internacia Junular-Kunveno en Wörgl.

Por la 9a fojo TEJO invitis la tutmondan junularon al internacia kunveno. Pli ol 80 gejunuloj el 12 landoj sekvis la inviton kaj veturis al Wörgl, al la ĉarma aŭstra urbeto en la lando de Tirolo. La junaj partoprenantoj ĝuis belegan semajnon en la pentrinda pejzaĝo kaj la imponaj montegoj vere miris pri la multkolora Esperantista popolo, kiu kunvenis por denove ĉeesti en amika familia rondo.

Komence tiu familio honoris sian patron, nian majstron Zamenhof, per solena florkronmetado antaŭ lia monumento, la unua en Eŭropo. Kaj nia majstro vere estis enmeze de sia familio dum la kongrestagoj en Wörgl. Eĉ la Wörgla Knabina Ĥoro kantis en Esperanto.

La honora prezidanto de la kongreso, sro korta konsilisto Hugo Steiner, prezidanto kaj fondinto de la Internacia Esperanto Muzeo en Wien, malfermis post la florkronmetado la kunvenon. El la multaj salutparoladoj, kiujn sro Hugo Steiner lerte tradukis en germanan, resp. esperantan lingvojn, oni ek-

sentis la intereson, ĝojon kaj subtenon de la aŭstraj instancoj, donitajn al la kongreso, same kiel oni sentis la mondvastan plivastigon de nia lingvo. Kunlaborantoj de Radio-Innsbruck ĉeestis kaj vespere ni povis aŭskulti, kio okazis antaŭtagmeze.

Kiel ĉiam, okazis laborkunsidoj, referaĵoj kaj diskutoj. Pri la ĉefkunveno de TEJO vi povos legi en ĉi numero specialan artikolon.

La famkonata verkisto sro Karl Vanselow el Berlino, verkis por la kongreso melodiriĉan kanton kaj ĉiam ĉie oni povis aŭdi ĝin. La gejunuloj kantis ĝin okaze de la belegaj ekskursoj, kiujn zorgeme aranĝis la organizanto de la kongreso, sro Hans Steiner. Ĉi tiuj ekskursoj konatigis la junajn gastojn kun la ĉarmaj pejzaĝoj de Tirolo.

Ni vizitis pri sia ŝlimbordbanejo famkonatan Kirchbichl. Por ne vekii erarigan impreson, mi devas rekonii, ke neniu el ni sin banis per ŝlimo. Anstataŭ tion ni ekzercis nin en poldancoj.

(daŭrigo sur la 2a kaj 3a paĝoj)

PARENTEZE.

Pardonon mi petas.

Ĉu vi iam sidis en la vagonaro? Ĉu vi en ĝi parolis nian karan lingvon kun viaj (samlandaj) geamikoj kaj ĉu vi tiam vidis la atentajn vizaĝojn de viaj kunvojaĝantoj ne-Esperantistaj? Jen iu el ili kiu diras al najbaro: „estas Italoj”, jen alia kiu diras: „estas Rusoj”. Kaj eble vi petole tiam faris rimarkojn pri tiuj kunvojaĝantoj, ĉar ili ja ne komprenis vin. La pli maljunaj gesamideanoj kapskue grumblos: „misuzo de la internacia lingvo”. Sed ni gejunuloj kelkfoje devas flankenŝovi la seriozecon kaj kial ni hontu pro tio? Tamen povas esti ke mi kaj du amikoj miaj dum la jena okazintaĵo iom troigis.

Trioje ni trajnis kaj en nia kupeo krome sidis du mezaĝaj virinoj kaj sinjoro. Ĉi-lastata legis en ĵurnalo kaj ŝajne aŭdis nenion. Komence nia konversacio tuŝis diversajn temojn

sed iom post iom venis rimarkoj pri la nenion-suspektantaj virinoj, interrompita de eksplodaj ridadoj. Ankaŭ la sinjoro ŝarĝis nia viktimo, sed kiam iu el ni nombris la similecojn, kiujn la viro havis kompare kun Sherlock Holmes, li leviĝis por iri al alia kupeo, kriante en Esperanto: „Bubaĉoj vi estas, oni devus ĵeti vin el la vagonaro!” Honte ni silentis, kaj ĉiu sentis ke „Sherlock Holmes” fakte estis prava. Sed longan tempon ni tiam ne pripensis la aferon, ĉar kiam unu el la virinoj diris al la alia: „ĉu vi estas certa ke ni troviĝas en la ĝusta vagonaro?” ni pene kaŝante nian ridon ankaŭ iris al alia kupeo!!

Tamen mi sentas la bezonon peti sincéran pardonon, speciale al la sinjoro, ja povas esti ke li legus ĉi tiun prozon



(daŭrigo de la 1a paĝo)

Alia ekskurscelo estis Kufstein. En tiu romantika urbeto ni admiris la monumenton de la fama heroo Andreas Hofer, kelkaj aninoj de la „wörgla knabina horo” kantis antaŭ la monumento nacilingvajn kantojn. Ni grimpis en Kufstein al la impona fortikaĵo, en kies muroj troviĝas la plej granda orgeno de la mondo, la t.n. „heroa orgeno”. Kun atento ni aŭskultis vespere la impresonan koncerton. Pro la pluvo kaj teknikaj malhelpaĵoj ni ne povis viziti Stadtberg, kvankam nia intereso estis jam per lumbildoj vekita.

La kongresa kanto eksonis ankaŭ de sur la montpintoj de Markbachjoch en alteco de 1800 metroj, kien alportis nin seĝoliftoj. Iu enloĝanto de Wörgl, bona konanto de la tuta

ĉirkaŭaĵo, klarigis al ni la diversajn sciendaĵojn pri la bone videblaj montopintoj. Ni vizitis tie supre ankaŭ la kabanon de la kongresa kassistino f-ino kainer. La portreto de Dro Zamenhof, pendanta sur la muro, milde rigardis al ni.

Neniu de la gejunuloj forgesos baldaŭ la grandiozan bildon, kiun ili ĝuis enmeze de nuboj sur la monto Hafelekar (2500 m) ĉe Innsbruck. Ni staris super la valo de la rivero Inn, je kies bordoj la landa ĉefurbo de Tirolo, Innsbruck, situas. Tiu ekskurso estis la kulminpunkto de la kongresaj tagoj.

Tre interesaj estis la paroladoj de Sro Dro A. Halbedl kaj de sro Neussner.

Sed okazis ankaŭ aliaj gravaj

aranĝoj. Ĝstu menciitaj la kunsidoj de la „ovo-klubo”, la tirola vespero, la filmvespero kun kolorbildoj, tablotenis'-konkurso (la premiojn gajnis la berlinaj junuloj Helmut Lehmann kaj Wietrzynski) kaj bankeskursoj. Ke la junaj esperantistoj bone scipovas danci, tion ili pruvis dum la internacia balo, kiu allogis ankaŭ la temperamentplenajn tirolajn bubojn en granda amaso. Agrablajn memoraĵojn kelkaj ĉarmaj partoprenantinoj hejmenportas de tiuj buboj, ne nur pro la sola fakto, ke ili instruis ilin jodli..... (Ĉu mirige, ke la koro de kelkaj esperantistoj pli forte batis pro ĵaluzo?.....)

Ankaŭ aliaj solenaj aranĝoj ne mankis. La urbestro oficiale akceptis la reprezentantojn de la 12 landoj. Ni metis floron sur la tombon de la energia subtenanto de la Zamenhof-monumento, la iama urbestro, sro Martin Pichler.

Tre edifa prediko Esperantlingva de kaplano Kaps kronis la lastan tagon de la kongreso.

Kiam fine la adiaŭa horo venis, ni kantis nian adiaŭan kanton kun vera korĉagreno pro la baldaŭa adiaŭo, ĉar ni tute ne emis disiri. Denove spertis la junularo la forton de Es-

peranto, kiu povas konstrui pontojn de koro al koro. Kun espero ĉiuj donis finfine unu al alia la manon kaj kantis kun larmoj en la okuloj: „Nur estas ĝis revido, frat', ni certe rekunvenos.”

La partoprenintoj ŝuldas sinceran dankon al la viglaj junuloj el Aschaffenburg, kiuj ĉiam ĝojigis nin per kantado kaj muzikado, al Sro Williams, kiu multe helpis en diversaj aferoj, al la jam menciita organizanto de la kongreso, sro Hans Steiner, kiu estis nelacigebla kaj al la redaktorino de „La Juna Vivo” s-ino B. kiu estis la „bona spirito” de la sukces- kaj ĝojplenaj tagoj.

Bri.

Redakcia noto: Min konfuzas la laŭdo de „Bri”. La partoprenintoj ne danku min, ĝuste kontraŭe, mi estas tiu, kiu devas ilin danki pro la tre agrabla konduto dum la kongressemajno. La sukceso de la kongreso ja ne dependas nur de la O.K.K. aŭ alia gvidado, sed ĉefe de la amikeco, kiun donacas la ĝejnuloj. Feliĉe en Wörgl la cirkonstancoj estis ĉiurilate favoraj kaj tial povis fariĝi la kongreso tio, kio ĝi fariĝis: morala kaj financa sukceso.

Tio okazis en W ö r g l.

Malofte okazas, ke tuta vagonaro atendas, ĝis kiam la Esperantistoj estas pretaj envagoniĝi. Tio okazis en Wörgl, dum la IX-a TEJO-kongreso. La kongresanaro intencis viziti la ĉarman urbon Kufstein, sed pro iuj miskromprenoj la junuloj ne sufiĉe frue atingis la stacidomon. S-ro Steiner do petis la lokomitivestron atendi, ĝis kiam ĉiuj alvenis. Kaj vere, li atendis pacience — eĉ dek minutojn! Tio povis okazi nur en la aŭstra urbeto Wörgl.....

Sed ankaŭ la pastro devis atendi, ĝis kiam ĉiuj alvenis. Antaŭ la dimanĉa diservo, dum kiu kaplano

Kaps predikis edife en Esperanto, okazis solena akcepto flanke de la urbo. La tempo urĝis, ĉar jam estis la 10-a horo, kaj la diservo devis komenciĝi. Tamen oni ja ankaŭ ne povis forlasi jam nun la urban konsilanton, kiu afable regalis la reprezentantojn de la 12 diversaj landoj. Do, oni denove petis por atendi, kaj eĉ la pastro atendis 10 minutojn ĝis kiam ankaŭ la „gravuloj” estis pretaj.

Oni eĉ flustris en Wörgl, ke Sankta Petro atendis kun malbona vetero, ĝis kiam la kongreso estis finita.....

LA JARKUNVENO DE TEJO.

Stranga okazintaĵo en la historio de TEJO: nek unu estrarano partoprenis la jarkunvenon. Kiel konate, Tammo Kanter kaj Geert de Vries ne ricevis permeson de siaj superuloj forlasi Nederlando, Felix Kat, la helpsekretario kaj Michel Duc Gominaz el Parizo estis malhelpataj. Kurt Meyer sendis skriban raporton.

Ceestis entute 16 personoj el 6 landoj. La jarkunvenon gvidis S-ino Burgler, protokolajn notojn faris Sro L. Giloteaux.

Bedaŭrinde pri la nuntempa stato de TEJO ni ne havis klaran superrigardon, sro Brinkmann kaj sro Neussner el Germ. voĉlegis la sekretarian jarraporton, aperintan en LJV, resp. la raporton pri la Dokumentado kaj Gazetarservo. La gvidanto de la Vojaĝservo sendis sian raporteton kun samtempa rezigno pri sia funkcio. La Informa Fako vakis, do ni ricevis nenian raporton. Mankis la kaskontrola raporto, la financa jarraporto kaj la buĝeto por 1953/54. Kelkajn tagojn post la kunveno evidentiĝis, ke nia kasisto estas grave malsana kaj tial li ne povis sendi la necesajn dokumentojn.

La redaktorino de LJV nur mallonge raportis. Ŝi akcentis, ke ŝi transprenis la taskon nur tial, ĉar estis neniu disponebla persono, kiu pretis la laboron fari. Ŝi venis al la IJK kun la decido forlasi sian postenon kaj transdoni la laboron al la gejunuloj. Bedaŭrinde neniu anoncis sin por la funkcio kaj tial ŝi pretis daŭrigi la laboron dum unu jaro.

Estas nerefutebla fakto, ke la aspekto kaj enhavo de LJV (danke al la modernaj ideoj de la estraro kaj ĉiufanka kunlaborado) multe pliboniĝis. Ni ricevas ĝenerale nur laŭdojn kaj multaj gejunuloj, kiuj ekkonas

LJV, volonte abonas ĝin. Sro Giloteaux protestis kontraŭ artikoloj pri lingvaj problemoj. Laŭ li tiujn oni povas legi ankaŭ en aliaj revuoj. La red. respondis, ke nur foje aperis art. pri lingvaj problemoj kaj ankaŭ tiam laŭ peto de la estraro, kiu konsistas el junaj homoj, do el propraj spertoj scias, kio interesas la junularon. Krome, oni devas klopodi kontentigi sufiĉe vastan kategorion de la abonantaro kaj ne neglekti la diversajn problemojn. LJV klopodas tuŝi ĉiajn junularproblemojn. Tiucele gravas la intensa kunlaborado. Ĉar la estraro respondecas pri la enhavo de LJV, sro William pledis por pli granda libereco por la red. Lia opinio la tasko de la estraro ne devas konsisti el kontrolado de la enhavo de la revuo. S-ino B. respondis, ke de post aprilo ŝi ne plu sendas la aperontajn artikolojn por aprobo al la estraro (nur en specialaj kazoj). Nun, ke ŝi povas labori memstare, ankaŭ LJV povas aperi ĝustatempe.

Dum la lastaj monatoj estis plendoj pri la enhavo de La Burgono. F-ino Nixon faris tion rekte ĉe la redaktejo, s-ino Kwantes dum la landa kunveno de TEJO. La redaktorino respondis, ke por ĝustmaniere redakti iun revuon, oni devas scii la aĝon de la legantaro. Tuj post la protesto de f-ino Nixon ŝi plisimpligis la stilon de LB. Laŭ peto de diversaj flankoj aperas nun ankaŭ simplaj enigmoj kaj konkursoj en LB. Ŝi jam kelkfoje kontaktis kun la estraro por aranĝi ĉi tiun parton laŭ la malnova, do antaŭmilita LJV, kiu estis facile legebla kaj sufiĉe ŝatata. Nun, ke ŝi ricevis de la estraro pli da libereco, ŝi klopodos ankaŭ L. B.-n aranĝi laŭplaĉe. Ŝi petis la helpon de la ĉeestant-

taj Esp.-instruistoj, ke ili verkigu artikolojn kaj sendu ilin evt. kun simplaj desegnoj kiel eble plej baldaŭ. Ankaŭ por la infanoj estas entuziasmige vidi la proprajn verkaĵetojn.

Sro Williams plendis, ke la asp. membroj pagas tro altan kotizon. S-ino B. respondis, ke ankaŭ ĉi tiu problemo jam okupas la estraron. Estas pli avantaĝe, ke LB ne aperu aparte, sed restu parto de LJV. Por ke la asp. membroj ricevu pli, ŝi jam kontaktis kun la estraro, ke LB aperu 3 paĝa. (Post la kongreso evidentigis, ke la afero ne estas facile solvebla, ĉar la presejo presis la kapojn grandkvante, sed eble ĝi povos fariĝi 4 paĝa, se la estraro estos akceptinta la proponon de la IJK por presigi la revuon sur malpli bonkvalita papero.) Sro Williams ripetis, ke la kotizo restas alta por la asp. membroj. Por alimaniere atingi bonajn rezultojn por TEJO, ni esploris la eblecojn, ĉu kursgvidantoj ne povus disvendi inter la kursanoj dum la daŭro de la kurso po nro LJV. Tiamaniere multaj kursanoj ekkonus LJV kaj eble poste ankaŭ abonus ĝin, aŭ fariĝus TEJO-anoj. Estas necese, ke la kursgvidantoj jam antaŭe anoncu (do ĉiam ĝis la 25a de la monato) kiom da ekz. ili deziras ricevi, ĉar ni mendas ĉiumonate nur la bezonatan kvanton. La kursgvidantoj, aŭ esp. instruistoj kontaktu pri tio kun la kasisto, aŭ sekretario.

Ni ne elektis novan estraron. La prez. Tammo Kanter pretas resti dum ankoraŭ unu jaro malgraŭ la fakto, ke li estas en militservo. Li mem elektos provizore siajn kunlaborantojn.

Mich. Duc Gominaz daŭrigos sian funkcion, por la Informa Servo elektigis sro Luc. Giloteaux. Por la Vojagĝservo post pritraktado de la di-

versaj eblecoj proponis sro Brinkmann sron Ebmeier. (La laboron versaĵne faros GEJ.)

(Ĉar estis antaŭvideble, ke dum la kongresaj tagoj ni ne povos pretigi la kongresan kasraporton, ni ne elektis kaskontrolan komisionon. En ĉi nro de LJV aperas la kongresa bilanco. La respektivaj dokumentoj, kiujn la gvid. de la kongreso po unu severe kontrolis, restas ĝis la sekvanta IJK ĉe la kongresa kasistino f-ino Kainer. Tiam laŭ bezono povas ĉion kontroli kaskontrola komisiono.)

Vigle ni diskutis pri la sekvanta kongresurbo. La estraro proponis ĝin organizi en Francujo, sed laŭ la ĉeestantaj francaj geamikoj tio apenaŭ eblas. La proponita Nancy ne tre taŭgas kiel kongresurbo, ĉar oni povas fari neniam ekskursojn sen sufiĉe altaj kostoj. S-ino B. proponis organizi ĝin en la proksimeco de la UEA-kongresurbo, Haarlem, do aŭ en Nederlando, aŭ en Okcident-Germanujo (ekz. Düsseldorf). Ambaŭ eblecoj estis simpatiaj por la junularo. Sro Brinkmann proponis la kastelon Gresillon en Francujo. Dum la kristnaskaj ferioj li veturos tien kaj li esploros la eblecon evt. por iu sekvanta IJK. Tamen li promesis kunlaboron de GEJ kaze ke IJK okazos en Okcident-Germanujo. Düsseldorf estus taŭga loko, ĉar tie estas eblecoj por aranĝi amasloĝejojn (la urbestro certe ree volonte disponigos la gimnastikejojn de la diversaj lernejoj tiucele, kiel dum la SAT-kongreso), ni devos klopodi trovi eblecojn sufiĉe malmultekoste manĝi. La estraro ne volonte organizigas IJK en Nederlando, ĉar dum la postmilitaj jaroj okazis en Nederlando jam du IJK-j. Kvankam certe alvenus pli da kongresanoj ol al Wörgl, ne estas interese organizi IJK-n kelkfoje en la sama ĉirkaŭajo.

— Anglujo estas por ni sufiĉe multekosta. Malgraŭ tio la anglaj geamiko-koj serĉos eblecon por organizi tie kongreson eble post 2 jaroj. Tion ni pritraktos en la sekvanta IJK.

Nian plenan atenton havis la kunlaboro kun aliaj junulargrupiĝoj. Post la kontrakto inter TEJO kaj la Junularsekcio de EANA kaj la kolektiva aliĝo de la Svisa Junularo, ankaŭ la germana junularo volonte farus similan kontrakton. Ni ne estis informitaj pri la financa flanko de la afero, tial ni ĉesigis la diskuton. Interesuloj sin turnu rekte al la estraro, laŭ bezono ni presigos ĉion en LJV. (Legu pri ĉi temo la komenton de la taga estraro, kiun ni voĉlegis dum la jar-kunveno.)

„Esperanton radias” aperos nur foje po jare, komence de la kalendaro jaro. La tiel ŝparitan lokon ni povos uzi por LB kaj por la necesaj recenzoj.

Pri „Helpe al nepagipovaj landoj” la sekr. plendis, ke ne estas sufiĉe de solidareco inter la junularo nur iuj, sendis al li legitajn nrojn de LJV, aŭ petis adresojn. Sro Neussner el Berlin-Lübars, Taubengasse 46. Franca sektoro refutis, ke li jam pasintjare en Ry anoncis, ke li kolektas (kaj aĉetas) ĉiuspecajn artikolojn (ĉiajn markojn, etiketojn de alumetoj, monbiletojn, veturbiletojn, insignojn de kongresoj, ktp.). La kontraŭvaloron li volonte disponigas por TEJO tiu ĉi cele. Sed ĝis nun alvenis neniam sendaĵoj.

Tamen ni devas helpi niajn geamikojn kaj ne lasi ilin solaj en la batalado por pli bona, pli bela estonteco, por interfratiĝo de la homaro.

La kunveno akceptis la proponon elekti la landajn perantojn ĉiujare. Vidu la klarigon en nia antaŭa nro.

S-ino B. post interkontakto kun la

kasisto, proponis enkasigi la jaran kotizon de TEJO jam dum la IJK. Kiel klarigon ŝi aldonis, ke la redakta, do ankaŭ administra jaro daŭras de sept. ĝis aŭg. Estas malfacile enkasigi la monon el eksterlando kaj tial TEJO havas financajn malfacilaĵojn. Ankaŭ la perantoj pagu la kotizojn kolektitajn laŭ eblo jam dum la IJK, ja preskaŭ ĉiam veturas iu amiko al la kongreso. Tia sistemo multe plifaciligus la taskon de la TEJO-kasisto.

La partoprenantoj ĝenerale malaprobis la proponon de la estraro plialtigi la kotizon. Estas vere, ke LJV estas malmultekosta porjunulara revuo, sed la junularo ne havas monon. Anstataŭ la nuna luksa aspekto aperu LJV en pli simpla eldono. Sro Giloteaux protestis kontraŭ verda kapo, sed s-no B. klarigis, ke la preskostoj ne multe diferencas kaj ke ĝuste la verda kapo plaĉas al multaj abonantoj kaj tiras la atenton. Krome montriĝis, ke en diversaj landoj oni tre ŝatas la du-koloran aspekton de LJV.

La estraro nun jam esploras la eblecojn por povi decidi pri la estonta aspekto de LJV. Laŭ la nuna agmaniero la presigo kaj dissendo de LJV kostas iom pli, ol ni povas enkasigi. La kasisto esperis ricevi donacojn por kovri la deficiton. Ni provizore ĝojigu lin, pagante nian kotizon antaŭ la 1a de oktobro.

Envenis ankaŭ diversaj proponoj de S-ino v. Veenendaal, la fondintino de TJO. Ŝi proponis elekti alian, resp. plikompletigi la estraron, elekti por La Burgono alian redaktorinon. Ĉar de la proponitaj personoj venis nenia konsenta respondo, nek iu el ili ĉesitis la IJK, ŝiajn proponojn ni sendis al la Estraro. Unu el la plej gravaj proponoj de s-ino v. Veenendaal daŭrigo sur la 7a paĝo.

KOMENTO pri la propono de Michel Duc Goninaz rilate al ĝenerala sistemo de aliĝo al TEJO

Julio/Aŭg. n-ro LJV.

Kiam ni konsideras la efektiviĝon de ĉi tiu propono, ni venas al la konkludo ke fakte la sama sistemo estas sekvata kia ĝi nun estas en UEA kun la jenaj diferencoj:

— ĉiuj aktivaj membroj havas la samajn rajtojn, i.a. ili havas plenan voĉdonrajton;

— nia organo LJV estos legata de relative pli da membroj.

La diferenco kun la propono nia (vd la junian n-ron de LJV) estas do ke la membroj de kolektive aliĝintaj grupiĝoj havas la samajn rajtojn kiel individue aliĝinta persono.

Kiam ni kombinas alian proponon de M. Duc Goninaz, nome realtigi la kotizon kiun ricevas la naciaj sekcioj je 20 % ni renkontas malfacilaĵon: fiksante nome proponi la individuajn kotizon je g. 1. — li aldonas „inkluzive de la parto por la landa sekcio“. Tio do volas diri ke la naciaj sekcioj provizore ricevas malpli da kotizo ol laŭ la nuna sistemo (nun de ĉiu persono 10 % de g. 3. — = g. 0.30 kaj tiuokaze 20 % de g. 1. — = g. 0.20).

Tio fakte ankoraŭ pligravigas nian proponon ke la perantoj havu la liberecon interkonsente kun la membroj en la koncerna lando plialtigi la kotizon favore al la landa kaso por fari la necesajn agojn en la pro-

gresigo de nia movado.

Por efektiviĝi ke nia organo vere estos legata de relative granda grupo de janoj, kompreneble estas necese ke oni fiksu minimuman nombron de kol. aliĝ. grupo, por kiu ili devas aboni la organon, ekz. 4 personoj.

Do: se grupo de 200 anoj kolektive aliĝus ili pagus:

indiv. kotizo $200 \times g. 1. = g. 200.---$

abono LJV $\frac{200}{4} \times g. 3. = g. 150.---$

sume g. 350.—

Kvankam oni pli emos aliĝi per la proponita sistemo, ni pripensu ke per la nuna sistemo (t.e. individua aliĝo) la sama grupo pagus $200 \times g. 3. = g. 600.---$ Diferenco g. 250.—!

Tamen la kolektiva aliĝo fariĝas pli kaj pli grava kaj en pluraj landoj Esperanto-junular-grupoj emas tiel aliĝi al nia organizo; krome estas de pleja graveco ke la junuloj Esperantistaj kunkune batalas por nia belega idealo, motivoj, kiuj devas nin fari kiel eble plej akordigemaj pri la definitiva fiksado de la kotizoj.

Ni pro tio principe subtenas ĉi tiun proponon, kies efektiviĝo poste certe donas la fruktojn.

En la nomo de la taga estr.

Felix H. Kat.

daŭrigo de la 6a paĝo.

estis, ke TEJO akceptu la homar-nismon kaj tiam ŝi certigas la junularon, ke la JV aperos ree 16 paĝa. Ĉar la propono envenis tre malfrue por esti serioze pritraktata, ni ne povis fari kian ajn decidon. Neniu povas nin kulpigi per tio, ke mankas el niaj koroj la interna ideo de Dr. Zamenhof. Eĉ se ni ne ĉiam kaj ĉie akcentas tion, la amika sfero dum

nij kunvenoj plej atestas ĝin. Ni ĉiam klopodas apliki la saman amon al la homaro, la saman interfratiĝon, kiun instruis ankaŭ Dr. Zamenhof. -Pro manko de intereso ni fermis pri ĉi temo la diskuton.

Kvankam ni povis fari nenian gravan decidon pro nia malgranda nombro, ni ĉiuj kontentaj forlasis la kunvenon.

BILANCO

pri la 9-a T.E.J.O.-Kongreso en Wörgl, 3-10.8.1953.

Enspezoj:		Elspezoj:	
Kongreskotizo por 64 partopr. kaj donacoj	1401.— §	Kaslibro	4.10 §
Enspezoj dum lumbildvespero kaj dum la Tirola Vespereo	306.40 §	Silkaj rubandoj laŭ interkonsento kun TEJO	150.— §
Enspezoj dum la Internacia Balo	546.— §	Afiŝanonco en Wörgl	29.25 §
Donaco de f-ino S. el Melbourne post la fino de la kongreso	100.— §	„ en Kirchbichl... ..	1.50 §
		Multobligado kaj matr. ...	29.50 §
			14.70 §
			24.60 §
		Afr. por la send. let. antaŭ la kongr.	115.40 §
		Dankl. al div. alranguloj en A. pro la subt.	12.— §
		Dankl. al salutintoj	18.— §
		Leterpap. kaj kov.	18.50 §
		Pakpap. k resendo de la prunt. flagoj	11.40 §
		Elspez. por manĝ. al help. el Innsbr.	34.— §
		Telefonparoloj	6.60 §
		Muzikado dum la kongr. malf. kaj transp. de fortepiano	107.20 §
		Lumbildprezento	56.— §
		Al kunlab. en T. Vesp. ...	415.— §
		Regalo laŭ tir. man.	85.60 §
		Trinkaĵo por la kantistinoj en Kufstein	22.— §
		Vojaĝelsp. Kufst. Innsbr. por la prez.	23.50 §
		La sama por 1 komitat. ...	53.80 §
		Imposto por la balo	32.25 §
		Aŭtoraj rajtoj	67.— §
		Muziko dum la balo	500.— §
		Pago al la help. en la kaso	35.— §
	2353.40 §		1866.90 §

Profito: 486.50 §.

Wörgl, 11.8.1953

Por O.K.K.
Hans Steiner

Por T.E.J.O.
E. Burgler-Jezsó

Krome pagis al la landaj perantoj 17 personoj, nome:

en Danujo	2
en Francujo	6
en Germanujo	8
en Nederlando	1.

Pri ĉi tiuj kongreskotizoj + eventualaj donacoj ni ne disponis en Wörgl, tamen ni devas ilin konsideri kiel profiton. Bonvolu la landaj perantoj — se ili ankoraŭ ne faris tion — sciigi al la kasisto, kiom da kongreskotizoj (+ donaco) estis al ili pagitaj, por ke ni povu havi klaran superrigardon.

Specialaj eldonaĵoj okaze de la IJK en Wörgl:

La Esperantista Junularo el Berlino eldonis specialan kongresnumeron de la „Juna Voĉo” okaze de la TEJOKongreso. Sur la 1a paĝo de la revue-

to troviĝas la kongresa kanto, kiun afable verkis la famkonata verkisto Sro Karl Vanselow, laŭ germana melodio.

Kune ni kantu.

Por ĝojon festi kaj kunesti geamikar' kun vi,
Feliĉa-kore kaj bonhumore ni sidas tie-ĉi.

/: La lingvon de l'espero uzu kun fiero kaj samideana ĝu',
Por ke la gloro kaj la valoro de ĝi aŭdiĝu plu. :/

Per partopreno en la kunveno la koroj sentu tuj:
Por nia rondo la tuta mondo jam estas la patruj'.

/: Kantadu ni kaj ridu, ke ni ofte sidu en simila rendevu'!
Volas fidele ni sama-cele amikoj resti plu. :/

Ĉiu partopreninto de la kongreso konas la german-esperantlingvan 4-paĝan helpilon, per kiu ni povis nin komprenigi. Laŭ-ordone ni ridis afable kaj montris al la diversaj vortoj, ankaŭ la kontraŭpartio ridis eĉ pli afable ol ni, ĉar la rido ja estas infekta, kaj ili serĉis la ĝustajn vortojn en nia tradukilo por helpi nin. Nur al iu angla fraŭlino ne sufiĉis la tradukilo, ŝi nepre bezonis tutan vortaron por povi komprenigi sin.

Eble Sro Steiner havas ankoraŭ kelkajn helpilojn, kiujn ni povos ree uzi, se nia kongreso okazos en germanlingva lando.

Ankaŭ specialajn cindrujojn oni fabrikis okaze de la IJK. Sur metala bazo estas muntita mane ornamita lignaĵo, kiu portas la surskribojn: Esperanto-Kongreso 3—9 aŭg. 1953, kaj aliflanke: Saluto el Tirolo, Wörgl. Sur unuflanko estas verda stelo, sur la alia la Zamenhof-monumento estas videbla. Rifuĝintaj hungarlandaj esperantistoj ĝin faris kaj vendis po 18 ŝil.

La Fremdul-trafika Oficejo de Wörgl volonte sendos al vi broŝurojn pri Wörgl kun Esperanto-teksto. Petu la almeton de bildo pri la Zamenhof-monumento.

Detalan 10-paĝan raporton sub la titolo „6 Jaroj Germana Esperanto-Junularo”, eldonis la GEJ-centro. Interesuloj povas senkoste ricevi tiun germanlingvan raporton ĉe la 2-a prezidanto de GEJ., Ewald Ebmeier, Bünde, Weidemaschstr. 28 (Germanio).

Germana Esperanto-Junularo invitas al regiona kunveno. Precipe la nederlandaj geamikoj estas invitataj al tiu konferenco, kiu okazos la 19-an kaj 20-an de septembro 1953 en Os-

nabrück/Germanio. La kunveno, kiu okazos en la famkonata pacsalonego, estos subvenciata de la germanaj ŝtataj instancoj. Informojn donas volonte: Gerd-J. Brinkmann, Herford/Germanio, Sandbrede 37.

Germana Esperanto-Junularo eldonos en la aŭtuno ampleksan novan junularan kantaroon. Ĝi aperos en la eldonejo de Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Germanio. Jam nun ni volas atentigi niajn legantojn al tiu grava longatendita eldono.

Dum la brile sukcesinta 9. inter-nacia kongreso de TEJO de la 3.-10.8.1953 en Wörgl, Tirolo, Aŭstrujo, la oficiala reprezentanto de la SKOLTA ESPERANTISTA LIGO kaj ties prezidanto s-ano J. van Gulck, s-ano D-ro Adolf Halbedl, nacia agento de SEL en Aŭstrujo, atentigis per paroladeto pri la parenceco de ambaŭ idealismaj junulorganizadoj kaj varme rekomendis al ĉiuj TEJO-anoj, penetri en la skoltan movadon kaj ĝin esperantistigi, ĉar ĝuste tiu ĉi tutmonda amasorganizaĵo kun nepre aplaudinda kaj obeinda eduk-kaj agadprogramo ĉiutage fari ion bonan por aliulo, ami sian patrujon kiel mozaikeron de la tutmondo, aspiradi taŭgecon en ĉiuj fazoj de la vivo k.s.-same nepre bezonas Esperanton kiel la plej daŭrigeman ligilon

inter siaj membroj, kiel ankaŭ TEJO bezonas la amasojn de la skoltoj en la tuta mondo.

Do, necesiĝis, ke kiom eble plej multaj skoltoj aniĝu al TEJO kaj kiom eble plej multaj TEJO-anoj fariĝu skoltoj.

La alvoko estis afable akceptata kiel la oficiala saluto de SEL al la kongreso, kies agrablega pasado vekis la viglan deziron de ĉiu partoprenanto, baldaŭ revidi unu la alian kaj ree ĝuadi tian kunestadon. Jam Haarlem montru la reciprokan trapenetrigon de ambaŭ movadoj. Sen Esperanto la skoltismo neniam atingos sian celon, kiel evidentigis la observado dum la mondtendaro 1951 en Bad Ischl.

Dr. A. H.

Antaŭ la 1a de oktobro nepre pagu vian kotizon. Post tiu dato vi devos pagi kostojn pro la enkasigo.



**KORESPOND-
ADRESOJ**

Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas ekspresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Germanujo: 50 gejun. ar. la 15an de okt. 1953a letervesperon. Ĉiuj ric. resp. Skribu multnombre al Huč Ringbeck, Köln-Sülz, Redwitzstr. 12.

Partoprenintoj de IJK en Wörgl! Skribu viajn impresojn pri la IJK al S-ino E. v. Veenendaal-Bouwes, Limmen, N.H. Nederlando. Ĉiu skribinto ricevos donace libron, la unua sendinto ricevos du librojn.

la burgono



MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



La malgaja rakonto pri Toby.

F-ino H. Davis.

Iam mi posedis testudon. Ĉu vi scias, kia ĝi estas? Ĝia korpo estas kovrita per „kiraso”, ĝi elpuŝas nur sian kapon kaj siajn kvar piedojn. Kaj kompreneble la voston.

La nomo de mia testudo estis Toby. Ĝi estis malgranda kaj sulka. Ĝi havis du brilajn okulojn, longan kolon. Ĝia ŝelo estis nigra kaj flava.

Ĝi volis puŝi sian kapon el la ŝelo por manĝi laktukon aŭ herbon.

Iun tagon mi metis ĝin en la ĝardenon. Ĝi pensis, ke ĝi estas en la lando de promeso. Tie ĝi manĝis kaj manĝis kaj fine ĝi manĝis ĉion, kio estis en la ĝardeno.

Eĉ ne unu floro restis.

Malĝoja afero! Tiuj floroj tute ne estis taŭgaj por la stomako de Toby kaj post kelkaj tagoj ĝi mortis.

La familio estis tre malĝoja pro tio. Ni enterigis ĝin sub roza arbeto en la ĝardeno. De tiu tempo ŝajnis, ke la rozoj en tiu loko kreskis kaj floris pli grandaj, ol la aliaj rozoj en la ĝardeno.

Eble la floroj, kiujn Toby manĝis, esti respondaj.

La aŭtuno.

La somero malrapide pasas. Pasas ankaŭ la someraj ferioj, kiujn ni tre ŝatas. Ni denove iras al la lernejo, ni denove devos lerni kaj esti diligentaj.

En la ĝardeno iom post iom velkas la floroj. Ankoraŭ ni povas vidi jen kaj jen rozojn, tamen ne multajn. Dalioj kaj asteroj floras nun ĉie. Ili estas tre belaj floroj.

Sur la fruktoarboj pendas la maturaj pomoj kaj piroj. Prunojn ni ne plu povas vidi, ni jam antaŭ kelkaj semajnoj kolektis ilin. La homoj kolektas la maturajn pomojn kaj pirojn kaj konservas ilin por la vin-

tro. La infanoj tre volonte helpas kaj eĉ pli volonte manĝas la bon-
gustajn fruktojn.

Loge rigardas al ni la vinberaj grapoloj. Kiu ne volonte kolektas,
aŭ manĝas ilin? En la landoj, kie kreskas multaj vinberoj, la homoj
faras el la vinberoj vinon. La vino estas ruĝa aŭ flava (blanka).

La folioj sur la branĉoj de la arboj perdas sian belan verdan kolo-
ron, ili fariĝas flavaj, aŭ ruĝaj. Post kelka tempo ili falos sur la teron
kaj kovros la teron per dika, mola folio-tapiŝo.

Multaj insektoj kaj malgrandaj bestoj trovos sub la folio-tapiŝo
dormlokon dum la vintro.

Niaj kantbirdoj forlasas nin, ili migras al pli varmaj landoj. Tiel
forlasas nin la hirundoj, la cikonioj, la sturnoj, la vaneloj. Nur la
paseroj restas al ni ĉiam fidelaj.

La tagoj estas malpli longaj, ol ili estis dum la somero. La suno
brilas malpli forte.

En la aŭtuno ofte pluvos.

Ĉu vi ŝatas la aŭtonon?

Konkurso: La Burĝono organizas konkurson. Faru artikoleon
pri viaj someraj ferioj. La plej belaj verkaĵetoj aperos en La Burĝono.
La verkintoj ricevos interesan premieton. Sendu viajn verkaĵojn antaŭ
la 25a de novembro al la redakcio.

La enigmon ĝuste solvis J. B. Hanley, 11 Central Drive, Romiley,
Cheshire, Anglujo. Ĝi estas la litero „a”. La solvinto sciigu al ni sian
aĝon, por ke ni povu sendi laŭ tio premion.

Kara panjo.

Kara panjo, kiam estos
plenkreskinta ankaŭ mi,
vi ne plu sen helpo restos,
ĉar laboros mi por vi.
Do anstataŭ vi matene
kafon jam kuiras mi,
ke en via lit' serene
plu ripozi povu vi.

Laŭ bezono ĉiam, ĉiam
viajn servojn faros mi.
Vin forlasos mi neniam,
vivi volas mi por vi.
Plue mia preĝo restu,
ke la tempo flugu pli
kaj jam baldaŭ, baldaŭ estu
plenkreskinta ankaŭ mi.

(El K. Vanselow: „Nia Lingvo Esperanto” II/1.)